



5*1992*152

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA-ESPERANTO-ASOCIO



En 1992 esperantistoj kongresis en la nomo de Komenio

Co dělá Rada ČES?

Podánilo se jí prosadit čestné členství UEA pro samideány J.Mařika a J.Vondrouška a čestné členství ISAE pro dr. J.Kavku, zajistit finančně i organizačně předkongres, vydávání Starta, Ročenky a knihy o Komenském (Lumo en tenebroj), získat podporovatele svazu v rámci kuponové privatizace.

Nyní připravuje konferenci ČES v Pardubicích ve dnech 23.-25.10.1992 a společný kongres s GEA o svatodušních svátcích 28.-31.5.1993 ve Františkových Lázních. A přirozeně musí zabezpečit řadu rutiních, ale nutných záležitostí pro chod svazu: registraci členské základny a placení členských příspěvků, zaplacení kolektivního členství v UEA, zaplacení nájemného a pojištění sekretariátu, přípravu nových stanov a právní zabezpečení svazových nadací, projednání žádostí o ustanovení nových sekcí (skautská) a jiných návrhů z řad členstva a při všem neustále sledovat, zda to svazová pokladna utáhne. Rada se schází každý měsíc.

Zprávy z prodejny svazu

Knížku "Anekdotoj pri famaj homoj", v překladu E.V.Tvarožka, vydanou v Bratislavě vydavatelstvem "Esperpres", si můžete objednat přímo u nás ve svazové prodejně. Cena jednotlivé knížky je 28,- Kčs. Při větším odběru poskytujeme obvyklé slevy.

Totéž platí o zbylých výtiscích knihy "Lumo en tenebroj" od Františka Kožíka o Komenském (přel. Z.Rusín) s ukázkami z děl Komenského (přel. M.Malovec), kterou vydal náš svaz pro účastníky pražského předkongresu a konference o Komenském. Kniha stojí 26,- Kčs (128 stran). Hromadné odběry na adrese: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno.

Průzkum zájmu: Máme možnost dovézt v omezeném množství z Moskvy za zvýhodněnou cenu 100,- Kčs knížku **E.Drezen: "Historio de la Mondlingvo"**. Podmínkou je, že knížku bychom mohli prodávat jen v tuzemsku, se závazkem, že nebude prodána do zahraničí (tam bude cena podstatně vyšší). Prosíme případné zájemce, aby se ohlásili na adrese sekretariátu (expedice).

KORESPOND! DEZIRAS:

Kristano el Niĝerio, komencanto en Esperanto, kiu amas desegni, verki poemojn kaj vojaĝi, deziras korespondi kun alilandanoj: Osho-Davies Oluwabunmi, ESQ, p.o.b. 93, RIZ IWARO QUARTER, Osi-Asise Ekiti, Nigeria.

Preskaŭ cento da esperantistoj el 19 landoj celis Pragon antaŭ ol ĉeesti la 77-an UK-on en Vieno. La oficiala antaŭkongreso, kiu tie ĉi okazis en la tagoj 19.-25.7.1992 anstataŭ planita Universala Kongreso almenaŭ iome plenumis sopiron de ĉeĥaj esperantistoj gastigi la tutmondan esperantistaron ĝuste en la jaro, en kiu oni omaĝis jubileon de la certe plej granda ĉeĥa filozofo kaj ankaŭ pioniro de universala lingvo - J.A.Komenský. La preparita antaŭkonresa programo do kalkulis kun multe pli vasta ĉeestantaro ol kia al Prago fine venis, tamen la programon tio neniel influis kaj ĝi estis plenumita sen ia ajn koncizigo. La 4-membra LKK surfrunte kun geedzoj Dvořák, kiuj faris la plej grandan parton de la prelaboroj, ofereme tage-nokte zorgis pri ĉiuj bezonoj kaj deziroj de la alvenintoj, kio certe ankaŭ kontribuis al bonegaj impresoj, kiujn ĉiuj partoprenintoj el la renkontiĝo forportis kun si. Sed ĉefe ĉiujn kontentigis abunda kaj varia programo.

La lundo kaj mardo estis dediĉitaj al la urbo mem - oni faris busan rondvojaĝon, poste tramariĝis la Kastelon kaj la subkastelan kvartalon Malá Strana. Oni vizitis ankaŭ mondfamajn unikajojn de la iama Juda Kvartalo. La etoso de la historia Prago ĉiujn ĉarmigis.

La merkreda programo ligis kelkajn travivaĵojn samtempe: En la belega historia Kavalira Salonego de la Palaco de Valdštejn en centro de Malá Strana okazis sub aŭspicio de eksministro pri kulturo kaj nuna prezidanto de la ĉeĥa parlamento Milan Uhde seminario pri Komenio. La seminarion parolade ĉeestis konataj esperantistaj

fakuloj. Doktorino Věra Barandovská-Frank prelegis pri pedagogia mesaĝo de Komenio, profesoro doktoro Novobilský prelegis pri Komenio kiel prapatro de lingvistiko kaj profesoro Giordano Formizi (Italio) prelegis pri filozofia kaj religia konceptoj de Komenio. Vespere en la sama ejo okazis altnivela arta programo, en kiu prezentigis kelkaj konataj ĉeĥaj kantistoj kaj muzikistoj.

La ĵaŭdo estis dediĉita al ekskursoj, kiuj celis kaj la sudbohemiajn arkitekturajn juvelojn - la historia husana centro Tábor, reĝaj kasteloj Zvíkov kaj Orlik - kaj la famajn okcidentbohemiajn banurbojn Mariánské Lázně kaj Karlovy Vary. Ankaŭ en la lasta tago - vendrede - oni povis dediĉi sian atenton al Pragaj memorindaĵoj, sed restis ankaŭ tempo por propraj deziroj kaj planoj.


En ĉiu tago okazis vesperaj distraĵ programoj: interkonna vespero, kolokveto pri la nuntempa Ĉeĥoslovakio, vizito de Nigra Teatro kaj adiaŭa vespero. Ĉi tie la programojn riĉigis ankaŭ al esperantistoj konata angla samideano R.Howard kaj pluraj membroj de la Praga Esperanto-klubo.

Sabate venis la momento, en kiu oni devis forlasi Pragon. La kontentaj "antaŭkongresintoj" veturis buse - kun la vizito-paŭzo en la folkloro urbo Strážnice - en Vienon por ĉeesti la plej grandan ĉiujaran feston de esperantistoj - la Universalan Kongreson.

La Praga antaŭkongreso postlasis al ĉiuj certe bonajn rememorojn. Sed ne nur la rememorojn, ĉar la antaŭkongreson akompanis kelkaj simpatiaj eldonaĵoj, kiuj daŭre dokumentos tiun ĉi sukcesan esperantistan renkontiĝon. La ĉeforganizintoj

preparis zorge kompilitan kongresan libron, kiu detale informis pri ĉiuj programeroj de tiu ĉi evento. Ĉeĥa Esperanto-Asocio al tiu okazo eldonis libron pri kaj de Komenio - Lumo en tenebroj. Tiu certe grave kontribuos al Esperanta libraro, en kiu gravaj materialoj pri kaj de Komenio malabundas. Kaj samtempe aperis ankaŭ Jarlibro de ĈEA 1992, kiu koncize informas legantojn pri aktuala stato de la movado en Ĉeĥio kaj iom tuŝas ankaŭ la movadon eksterlandan.

kov



"La plej granda Universala Kongreso post la dua mondmilito en la *okcidento*" - tiel karakterizis la ekantan semajnon da kunlabora kunesto la prezidanto de la Loka Asista Komitato, Hans Maitzen. Sed li tuj precizigis siajn vortojn: post la "falo de muroj de miljaroj", kiun ni spertis en Eŭropo ekde la jaro 1989, la kontraŭstarigo *oriento-okcidento* ekperdas sian senco.

Kiel konate, la 77-a UK estis planita por Prago okaze de la 400-jara datreveno de Komenio, sed la malcerta politika kaj ĉefe ekonomia situacio kaŭzis, ke UEA preferis Vienon. Pragaj hoteloj kaj aeroporto ne kapablis unu jaron antaŭ la kongreso garantii siajn prezojn, kio povus finance kolapsigi la tutan aranĝon. Ne estas vero, ke ĈEA rifuzis aŭ ne kapablis la kongreson aranĝi, kiel oni tamtamas en la esperantistaro. UEA restigis en Prago la antaŭkongreson, proponis al Prago la 81-an UK en 1996 kaj la Vienanoj sendis al ĈEA pardonpetan leteron, en kiu ili senkulpigis sin pro "forkapto" de la kongreso. La kaŭzoj por la translokigo de la kongreso estis objektivaj.

La Vienan kongreson partoprenis pli ol 3 mil personoj - ĝi estis la plej granda kongreso el tiuj, kiuj okazis en nesocialismaj landoj. La kongresejo en UNO-City, Internacia Viena Centro, estis eminenta, tamen krom esperantistoj neniu sciis, ke en ĝi gastas Esperanto. En la urbo ni trovis neniujn afiŝojn kaj eĉ sur la kongresejo mem estis la flago apenaŭ videbla, de la metroa stacio tute ne.

Dum la inaŭgura soleno, kiu okazis inter la 10-a horo kaj

12.30 en la impona kaj teatrece duonluma salono Zamenhof, la proksimume 2500-kapa ĉeestantaro ĉiuminute spertis la modifigon de la eŭropa realaĵo, kiu ne povis ne influi nian Esperantan scenon. Pluraj paroladoj aludis la tumultajn okazaĵojn, kiuj plagas regionojn situantajn je la sojlo de nia kongreslando. Pluraj landaj asocioj havis la okazon saluti la kongresanaron je la unua fojo - ĉu ĉar ilia lando ĵus sendependiĝis, ĉu ĉar antaŭe mankis al ili eblo alveturi la kongresajn landojn.

La kongresejo ne nur disponigis grandan kvanton de taŭgaj salonoj kaj salonetoj, kiuj dum la kongreso portis nomojn de movadaj eminentuloj, sed danke al klimatigo ankaŭ rifuĝejon antaŭ la terura varmego, kiu turmentis la urbon.

La granda ceremonia inaŭguro okazis kompreneble en la plej granda salono, kiu same kompreneble portis la nomon de Zamenhof. Prezidanto John Wells prezentis la estraron de UEA kaj gastojn el ministerioj, sinjoron Louis Zaleski-Zamenhof, nepon de Majstro, kaj la reprezentanton de Loka Kongresa Komitato, kiu preparis la tutan kongreson. En siaj konkordaj vortoj prezidanto prof. John Wells emfazis, ke nia ĉeesto en urbo internacia kiel Vieno signifas re-aserton de nia konvinko, ke Esperanto estas ĝusta kaj justa solvo por la monda lingvoproblemo.

Post la aludita bonveniga saluto de Maitzen, laŭtlegis Heiner Eichner kaj Herbert Meyer la mesaĝon de la aŭstria federacia prezidento Thomas Klestil, kiu esprimis sian simpation al ni, esperantistoj, kiuj per sia strebo al lingva

interkompreniĝo kontribuas al la interpopola kaj interkultura proksimiĝo. Alia mesaĝo, tiu de nia Alta Protektanto Heinz Fischer, prezidanto de la aŭstria parlamento, mem filo de esperantistaj gepatroj, enhavis la deziron, ke Esperanto estu ne nur historia memoraro i.a. de ĉi laborista movado, sed ankaŭ ideo por la XXI-a jarcento.

La ĝenerala direktoro de la Aŭstria Nacia Biblioteko, s-ino Magda Stedl salutis nome de la Ministerio pri Scienco kaj Esploro. Ŝi elvokis la figurojn de famaj aŭstriaj esperantistoj kiel iama federacia prezidento Franz Jonas kaj la fondinto de la Internacia Esperanto-Muzeo, Hugo Steiner. Persone alparolis la kongreson ankaŭ la estro de la Viena UNESKO-Komisiono, s-ro Mornadou Seck. Li substrekis la similecon inter la klopodoj de Unesko kaj UEA: ĉar militoj naskiĝas en la spirito de la homoj, en ilia spirito necesas batali kontraŭ ili.

Post kutimaj alparoloj de diversaj parolantoj, kiuj deziris al la kongreso sukceson, estis proklamitaj novaj honoraj membroj de UEA. Por ni gravas, ke inter ili aperis ankaŭ du ĉeĥoj, samideanoj **Jaroslav Mařík** kaj **Josef Vondroušek**. Male malpli ĝojiga estis miskompreno inter niaj konsilianoj, kiam la reprezentantoj de unuopaj landaj asocioj salutis la kongreson, nur la ĉeĥa saluto mankis; tio versajne plifortigis la suspekton, ke ĉeĥoj intence sabotis la kongreson en Prago. Sed fakto estis pli simpla: la maro de la kongresanoj tiel dronigis kaj disigis niajn reprezentantojn, ke ili ne sciis unu pri la alia, nek rimarkis, ke la prezidanto momente malĉeestas pro ia traktado. La Konsilio konscias pri sia eraro kaj kulpo kaj petas pardonon.

Ĉiutage pluraj samtempaj

prelegoj allogis multajn aŭskultantojn en unuopajn salone-tojn por aŭskulti pri terminologio, instruado, kuracado, skoltismo k.s. En la kunveno de ISAE estis akceptita honora membreco de ISAE por nia **doktoro Josef Kavka**, kaj en Belartaj konkursoj venkis en la kategorio "eseo" nia **ing. Jan Werner** kun sia eseo pri rilato inter vorto kaj nocio. En granda salono "Kalocsay" estis aranĝita libroservo kun multegaj novaj, tre interesaj, sed por ni ankaŭ tre multekostaj libroj en Esperanto. En la kunveno de ILEI estis unu horo dediĉita al nia Komenio. Okazis koncertoj, inter alie kantis ankaŭ nia **Miroslav Smyčka**, kabaredo kaj dufoje estis prezentita komedio de Goldoni, Mirandolina. Dum merkreda ekskursita tago aŭtobuso de kongresanoj vizitis ankaŭ sudan Moravion kaj ekspozicion de filatelo en **Strážnice** sub titolo "Komenio kaj interlingvistiko en filatelo". Kunvenon pri terminologio gvidis **ing. Jan Pospíšil** el Kladno.

Komprenoble, la plej grava afero estis elekto de nova estraro de UEA. Jen estas la rezultoj de voĉdonadoj:

Prezidanto: D-ro John WELLS
Estraranoj: Ulrich LINS
Mark FETTES
Ian JACKSON
Hans BAKKER
SO GILSU
Michaela LIPARI

La venonta, jam 78-a UK gastos en la hispana Valencio.

La Infana Kongreseto trovis sian lokon en la urbo Melk. Venis 36 infanoj el 15 landoj.

Miroslav Malovec

LA KONGRESA TEMO:
KIAM FALAS MUROJ DE JARMILOJ

Post la esperigaj politikaj eventoj de la jaroj 1989 kaj 1990 okazas nekredible teruraj aferoj en nia kontinento. La esperantistoj ne fermis la okulojn antaŭ la malhoma situacio kaj formulis rezolucion, kiu rekte sin turnas kontraŭ milito ka perforto:

KONGRESA REZOLUCIO

La 77a Universala Kongreso de Esperanto kunvenanta en Vieno, Aŭstrio, de 25 julio ĝis 1 aŭgusto 1992 kun 3033 partoprenantoj el 69 landoj,

DISKUTINTE pri la temo "Kiam falas muroj de miljaroj: komuna eŭropa domo",

KONSTATAS, ke plu ekzistantaj muroj, ekonomiaj, religiaj, lingvaj, kaj kulturaj, ankoraŭ dividas la popolojn de Eŭropo, kaj ke misuzata sento de grupaparteno nun kaŭzas suferojn por milionoj da homoj,

EMFAZE SUBSTREKAS, surbaze de la spiritaj valoroj de la movado por la internacia lingvo Esperanto, la senkompromisan kondamnon de milito kiel ilo por solvi interetnajn problemojn, esprimante samtempe fortan indignon pri la malhomecaj agoj, kiuj estas farataj pretekste de la militado,

DEKLARAS, ke tiaj barbaraĵoj estas konsiderindaj kiel krimoj kontraŭ la homaro kaj neniel estas pravigeblaj per naci-defendaj sloganoj,

AVERTAS krome kontraŭ la respekto de rasismaj tendencoj en multaj landoj de Eŭropo, ankaŭ ekster la militaj regionoj,

ATENTIGAS, ke la movado por la internacia lingvo Esperanto jam dum unu jarcento klopodas disvastigi la ideon pri la samvaloreco de ĉiu nacio kaj pri la rajto de ĉiu individuo difini sian propran identecon,

KAJ TIAL SUBTENAS la strebadon de unuopaj etnoj kaj individuoj akiri decidpovon pri siaj propraj aferoj, sub absoluta kondiĉo ke ili ĉiam respektu la rajton de aliaj,

ATENTIGAS, ke la revo pri komuna eŭropa domo postulas pli grandan ekonomian egalecon inter malsamaj eŭropaj regionoj,

SAMTEMPE SUBSTREKAS, ke samaj principoj de respekto, egaleco kaj solidareco ankaŭ estu kondiĉoj por la rilatoj inter Eŭropo kaj le cetera mondo,

KAJ ESPRIMAS sian solidarecon al la viktimoj de la militaj eventoj kaj sian pretecon laŭeble helpi la esperantistajn travivintojn, kaj surloke kaj en la rifuĝregionoj.

*laŭ Aŭstria Esperanto-Revuo,
n-roj 7-9/1992*

PUPTeatra FESTIVALO
EN KLagenfurt

Tuj post la kongreso festivalis en la aŭstria urbo Klagenfurt invititaj profesiaj pupteatroj, kutime germanlingve. Kiel venkinto revenis la pupteatro Radost el Brno kun sia popola teatraĵo pri Faŭsto, prezentita dufoje germane kaj dufoje en Esperanto.

NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE UEA

Sabate (1992-07-25) la Komitato decidis atribui Honoran Membrecon de UEA al la jenaj meritplenaj personoj:

Sylla Chaves, (Brazilo),
i.a. pro la provizado de modernaj instruiloj al la brazila E-movado;

Ferenc Jaki (Hungario),
pro la iniciatoj ligitaj kun la leĝigo de la elekteblo de E-o kiel studobjekto en ĉiuj hungaraj lernejoj;

Leopoldo Konoedt (Brazilo),
i.a. pro la traduko de "La luzidoj", unu el la plej elstaraj tradukaj entreprenoj;

Jaroslav Mařík (Ĉeĥoslovakio),
pro diversflanka agado;

Elna Matland (Norvegio),
pro la organizaj sukcesoj ligitaj kun la UK en Bergenjo;

Olle Olsson (Svedio),
pro la multjara pedagogia agado, i.a. por ILEI;

Umberto Stoppolani (Italio),
pro la multaj iniciatoj kaj atingoj en la lastaj 3 jaroj kadre de IFEF;

Josef Vondroušek (Ĉeĥoslovakio), pro traduka kaj pedagogia agadoj;

E.L.M. Wensing (Nederlando),
pro la agado en UEA-estraro kaj pro la efektivigo de "Internacia komerca-ekonomika vortaro".



JOSEF VONDROUŠEK

Josef Vondroušek naskiĝis la 1-an de decembro 1904 en Brno. Post finstudo de la komerca akademio li eklaboris en Ciri-la-Metoda monpruntejo en Brno kiel bankoficisto kaj poste li oficis en la Stata ŝparejo. Li laboris ĝis la fino de 1964, kiam li emeritiĝis. Apud Esperanto interesas lin ankaŭ la historio, literaturo kaj violonludo.

Li esperantistiĝis en 1922, kaj sekvan jaron li membriĝis ĉe Esperanto-klubo en Brno. La klubo en 1923 aranĝis grandan ekspozicion enkadre de la Foiro de Brno en vestiblo de la komerca akademio, sed vane serĉis deĵoranton. Fine oni trovis la 18-jaran Josef Vondroušek, kaj tiu dum du feriaj semajnoj deĵoris en la ekspoziciejo po 12 horoj tage. Tiam li vendis pli ol 500 lernolibrojn kaj disdonis milojn da flugfolioj, la klubo plibonigis siajn financojn. Josef ricevis senpagan membrecon por 1923, sed ekde 1924 li jam pagis. Post abiturienco li regule vizitadis la klubon, fariĝis protokolisto kaj post du tri jaroj sekretario. Kiam estiĝis konflikto inter komitatoj, por tranĉi la situacion oni elektis lin kiel prezidanton, sed post reglatigo de la afero li denove laboris kiel sekretario. De junio 1945 ĝis decembro 1981 li estis prezidanto de la klubo, informadis la gazetaron (aperis kelkcent informoj, eĉ pli grandaj artikoloj). En la kvindekaj jaroj li vizitis kun prof. Can-ko Murgin (Bulgario) prof. d-ron F. Trávníček, rektoron de universitato en Brno, kontraŭ-anton de Esperanto - fine d-ro Trávníček deklaris, ke li ne estas kontraŭ Esperanto, ke li estis centfoje instigita verki kontraŭ la Internacia Lingvo,

sed li ne faris tion (fakte la komunista partio komisiis lin batali kontraŭ Esperanto). La Esperantista klubo de Brno sub gvido de s-ro Vondroušek prezentis kaj prezantas ĝis nun bonajn rezultojn. Li estas motoro de Bulteno de EK Brno kaj de vesperaj programoj en la klubejo kun bonkvalitaj prelegoj, al kiuj li spronas la membrojn. Kun artistoj de la operejo de Brno li preparas altkvalitajn koncertojn por la klubanoj. Ĝis nun li administras la klubajn korespondaĵojn (de 1945 ĉirkaŭ 10 mil forsenditaj leteroj).

Al liaj aktivecoj apartenas instruado en la klubejo kaj en la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, kie li specialiĝis pri historio kaj literaturo de Esperanto, same kiel en la ekzamena komisiono de ĈEA. Li ankaŭ aŭtoris la popularan lernolibreton **Historio kaj biografioj** (eldonis EK Třebíč), kiu jam aperis en du Esperantaj versioj kaj en la ĉeĥa traduko. Kiel sperta preleganto kaj instruanto li ofte estas invitata ankaŭ al eksterlando (Svedio, Hungario, Germanio). Kun ceteraj klubanoj li preparis grandajn ekspoziciojn pri Esperanto en Brno en la jaroj 1936 (Katolika kongreso), 1950 (Foiro de Brno), 1957 (Art-industria muzeo) kaj 1965 en Mozaika Salono de la malnova urbodomo.

Lia ĉefa merito de la tutmovada signifo estas esperantigado de ĉeĥaj literaturaĵoj "en brila traduko", kiel esprimis sin Ivo Lapenna en "Esperanto en perspektivo" (paĝo 200). Libroforme aperis **Libro de apokrifoj** (Praha 1969) kaj **Rakontoj el unu poŝo kaj Rakontoj el la dua poŝo** (Praha 1981), ambaŭ de Karel Čapek, **Ondro kaj drako** de Viktor Dyk (Třebíč 1985), **El mia vivo** de Vítězslav

Nezval (Třebíč 19845), **Ĝojoj de mia vivo**, fragmentoj el Alois Jirásek, Karel Čapek kaj Jan Šmíd (eldonis ĈEA 1984 en la serio Panoramo) kaj **Karel Čapek**, broŝuro pri la granda verkisto kun fragmentoj el liaj ĉefaj verkoj. Al liaj tradukoj apartenas ankaŭ **Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto** preparita de Zdenko Křimský (Praha 1981).

Sed ankoraŭ multaj tradukoj atendas sian publikigon. De Karel Čapek precipe **Milito kontraŭ Salamandroj** (nun preparata por publikigo), **Naŭ fabeloj**, **Hordubal**, **Meteoro**, **Ordinara vivo**, **El vivo de insektoj**, **Afero Makropulos**, **Italaj Folioj**, **Anglaj Folioj**, **Ekskurso al Hispanio**. Plue **Saturnin** de Zdeněk Jirotka, **Malnovaj ĉeĥaj mitoj** de Alois Jirásek, **Puraj ĝojoj de mia vivo** de Jan Šmíd, **El notlibro de Sankta Petro** de Jarmila Hašková, **Propra biografio** de Karolo IV, de František Kožík **La plej granda el pierotoj** (tradukata kune kun la ĉefa tradukanto Jiří Karen) pri la fama ĉeĥdevena mimo Debureau kaj **Super la valoj mateniĝas** (Hetmano Šarovec) de František Kožík, **Edzinigebla knabino** kaj **Zorgoj de kronitaj (kapoj)** de Miloslav Švaňdrlík, fine **Primoj** de Svatopluk Čech kaj **Aŭdienco** de Václav Havel kaj komencita estas traduko de **Ŝtono kaj doloro** de Karel Schulz pri Michelangelo.

Josef Vondroušek estis en 1979 distingita per honora membreco de ĈEA kaj en 1992 per honora membreco de UEA.

JAROSLAV MAŘÍK

Pri Jaroslav Mařík ni skribis en Starto 2/92 en rubriko pri honoraj membroj de ĈEA. Necesas do aldoni informon pri honora membreco de UEA aljuĝita en UK Vieno 1992.

ILEI-KONFERENCO EN BRATISLAVA

Tuj post la UK en Vieno kunvenis en Bratislava (1.-7.8.-1992) esperantistaj instruistoj, 94 personoj el Argentino, Aŭstralio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Francio, Germanio, Hungario, Islando, Israelo, Italio, Jugoslavio, Kroatio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Slovenio, Svedio, Usono, Zairio. Kun ili ankaŭ 19 geknaboj 13-16jaraj (el 8 landoj), kiuj partoprenis unusemajnan gimnazion (instruadon pere de Esperanto); tiu nova eksperimento donas ŝancon al la geknaboj (tro aĝaj por la infana kongreseto kaj tro junaj por la TEJOKongreso) renkontiĝi kaj apliki la lingvon, samtempe per ili oni povis demonstri diversajn metodojn de instruado, pri kiuj oni parolis en la konferenco.

La konferenco estis dediĉita al la heredaĵo de Komenio (ILEI preparis libron pri li por geknaboj, tradukitan el la nederlanda, ĈEA libron por plenkreskuloj el la ĉeĥa). La aŭskultantoj aŭdis jenajn prelegojn: Ĉu ni instruas sufiĉe? (McGill) - Internaciaj edukaj programoj (Lins). - *Methodus linguarum novissima*. Pri la pansofiaj kaj lingvo-instruaj teorioj de Komenio (Barandovská). - Pri la vivovojo de Komenio (Malovec). - Piktogramoj kiel demonstrilo en la E-instruado (Keresthegyi). - E-instruado en Bialistoko (Parzyszek). - Kiel efikiĝi nian instruadon? (Barcsay) - La pozicio de instruisto en la instruado de fremdaj lingvoj, inkl. Esperanto (Martonová). - Esperanto kiel la *unua* fremda lingvo (Glossop).

Eksprezidanto de ILEI, s-ro Symoens, plendis pri manko de novaj lerniloj kaj legolibroj, la nuna prezidanto Stefan McGill prezentis la duan volu-

mon de sia lernolibro por geknaboj Tendaraĵoj II. Redaktoro de Eventoj, s-ro Szilvási, konsilis ne doni al la kursanoj diplomojn antaŭ ol ili vizitos E-renkontiĝon kaj abonos E-periodaĵon.

Grandan intereson vekis prelego de Atilio Rojas (Argentino) "Kolumbo el Amerika vidpunkto". La alveno de eŭropanoj signifis krimojn kaj likvidon de la indiana kulturo kaj eĉ la termino "malkovro de Ameriko" estas ofende koloniiga (ĉu la indianoj festu "malkovron de Eŭropo", kiu same aperis antaŭ ili kiel novaĵo?).

Paralele okazis ankaŭ ekzamenoj, Ĉe-kurso, la partoprenantoj dufoje ekskursis tra ĉirkaŭaĵo de Bratislava, koncertis al ili traveturanta bulgara infana koruso "Steletoj", lokaj folkloraj artistoj kaj eĉ talentuloj el la vicoj de instruistoj kaj gimnazianoj. La geknabojn instruis ges-roj Rösler (muziko), s-ro Arnaudov (matematiko), s-ro Tvarožek (E-literaturo), s-ro McGill (geografio), s-ino Tileux (didaktikaj ludoj), pri la tuta gimnazio zorgis s-ino Zsuzsa Barcsay.

En la estraraj kaj komitatitaj kunsidoj estis aprobitaj nova regularo, trijara plano, budĝeto, proponoj pri honoraj membroj de ILEI kaj kriterioj pri la plej aktiva sekcio. En la estraro estis Zsuzsa Barcsay anstataŭigita per d-ro Till Dahlenburg. Por ĉeĥoj kaj slovakoj la konferenco solvis ankaŭ problemon de membrokotizoj de ILEI en akceptebla maniero.

Miroslav Malovec

LA PEDAGOGIA SEKCIO DE ĈEA SUR NOVA VOJO

Kvankam ĈEA havas sian propran pedagogian sektion, ĝia ekzisto estas pli malpli nur formala. La membroj ne pagas kotizon, la sekcio ne eldonas propran gazeton, la membroj ne raportas pri sia pedagogia agado, pro manko de reciprokaj informoj inter la komitato kaj la membraro ne estas aktualigata la adresaro. **Praktike ne ekzistas diferenco inter membro kaj ne-membro.** Sen informado kaj organizado la sekcio ne funkcias.

Novan ŝancon por revivigi nian pedagogian sektion prezentas nia aktiva partopreno en **ILEI** (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kies ĉiu membro ricevas jare 4 numerojn de **IPR** (Internacia Pedagogia Revuo). Ĝis nun nia partopreno estis nur simbola, ĉar ĈEA aĉetadis kelkajn ekzemplerojn de IPR en svedaj kronoj (50 SEK = 250 Kĉs), sed nun ĉiuj niaj instruistoj, instruantoj kaj interesitoj povas sian membrecon kun la 4 numeroj de IPR (sume ĉ. 160 paĝoj) aĉeti kontraŭ **100 ĉeĥoslovakaj kronoj** (la sumo entenas ankaŭ la sendokostojn, ĉar la revuo alvenas perpoŝte el Artverpeno).

Estis interkonsentite, ke la monon por ILEI kolektos Esperanto-Centro Poprad (Sobotské nám. 6, 058 01 Poprad) por la tuta Ĉeĥoslovakio (simile kiel ĈEA kolektas ĉeĥoslovakajn abonojn por la duŝemajna gazeto *Eventoj*) kaj ke ILEI uzos la monon en nia lando (ekz. por eldonado de lerniloj). Post eventuala divorco kaj konfederigo de niaj respublikoj ni adaptos niajn rilatojn laŭ nova situacio.

Ĉe la sama adreso eblas aboni kontraŭ Kĉs ankaŭ aliajn eldonaĵojn de ILEI:

Juna amiko 80 Kĉs
Tendaraj Tagoj I. 55 Kĉs
Tendaraj Tagoj II. 60 Kĉs

La interesiĝantoj pri la membreco en la ĉeĥa ILEI-sekcio petu aliĝilon ĉe la administra sekcioŝtiro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno. La membrokotizon 100 Kĉs pagu al Esperanto-Centro Poprad per ordinara poŝtpagilo C, nur ne forgesu noti dorsflanke, ke vi pagas ILEI-kotizon.

La ĝisnuna pedagogia sekcio de ĈEA ne estos nuligita, sed la membroj sen membreco en ILEI kaj sen kontaktoj pere de IPR restos nur "mortaj animoj" en la sekcio kiel ĝis nun.

Kion ILEI proponas al vi:

- kiel membro vi ricevos la organon de ILEI *Internacia Pedagogia Revuo* 4-foje jare, plena de fakaj artikoloj pri lingvo-instruado; ankaŭ via pedagogia laboro povas esti prezentita en ĝi;
- vi povas partopreni unusemajnan konferencon kun kolegoj el diversaj landoj;
- vi povas sperti instruadon pere de Esperanto en la praktiko, kadre de la ILEI-gimnazio okazanta paralele kun la konferenco;
- vi povas partopreni la renomajn Internaciajn Metodikajn Seminariojn aŭspiciatajn de ILEI kaj aranĝojn de aliaj sekcioj;
- vi povas pruvi vian lingvan kapablon pere de la tri-ŝtupa ekzamena sistemo de ILEI (internaciaj ekzamenoj);
- vi povas mendi la periodaĵon *Juna amiko* por geknaboj kaj aliajn publikajojn de ILEI;
- informojn pri via pedagogia agado ILEI envicigos en siajn statistikojn pri la E-instruado en la mondo, kaj tiel vi kontribuos al poresperanta argumentado.

Kiu rajtas membriĝi?
Iu ajn, kiu interesiĝas pri lingvo-instruado kaj internacia edukado.

**TRIJARA LABORPLANO (1992-94)
DE ILEI (koncizigite)**

1. Sekcioj kaj membroj

- teni intensajn kontaktojn kun la sekcioj kaj membroj per IPR kaj cirkuleroj
- revigligi sekciojn neadekvate funkciantajn, starigi novajn sekciojn
- admoni sekciojn, havantaj memembrojn, kiuj restas neanoncitaj
- starigi novajn vojojn akcepti kotizpagojn per varoj kaj servoj - lanĉi konkurson por la plej aktiva sekcio

2. Komisionoj kaj komisiitoj

- malcentrigi la laboron per aktivaj internaciaj kunlaborantoj (komisionoj, unuopuloj)
- laŭgrade transigi la pli rutinajn taskojn al honoraritoj

3. Financo

- kreskigi la kapitalon de la Ligo
- alvokadi por donacoj al Fondaĵo Szerdahelyi
- faciligi testamentadon al la Ligo
- permesi aliron al servoj de ILEI (membrecio, eldonaĵoj, konferencoj) en nekonverteblaj valutoj kaj trovi manieron kiel uzi la monon
- instigi ekstermovadajn instancojn al sponsorado de edukaj projektoj

4. Ekzamenoj lingvaj

- reekzameni la postulojn de la elementa kaj meza niveloj
- lanĉi la superan nivelon
- krei konsilarojn, gvidilojn, ekzercarojn, rekomendatan libroliston por la ekzamenantoj kaj kursocentroj

5. Servoj al instruistoj

- registri kursojn ĉiunivele

kaj aperigi la rezultojn en la sama lerneja jaro

- registri kaj ekspluati la kondiĉojn de instruado en diversaj landoj
- aperigadi korespond-petojn, akceli reciprokajn kontaktojn, vizitojn
- diskonigi internaciajn aranĝojn per lernejoj kaj pedagogoj
- diskonigi servojn de sekcioj kaj lernejoj al vizitantoj

6. Instruista trejnado kaj universitata agado

- apogi kaj organizi Internaciajn Metodikajn Seminariojn
- fortigi la metodikan flankon de niaj konferencoj
- apogi aŭ starigi metodikajn kursojn (enmovade kaj kadre de oficialaj instruistaj trejnejoj)
- peri inter universitatoj kun oficialaj aŭ duon-oficialaj kursoj
- diskonigi disertaciojn verkitajn en aŭ pri Esperanto
- diskonigi la eblecojn por internacia klerigo

7. Konferencoj

- logi partoprenantoj el plej diversaj mondpartoj, unuavice praktikajn instruistojn de Esperanto
- fortigi la fakan programon
- faciligi interŝanĝon de spertoj pri instruado

8. Eksteraj rilatoj

- kontaktadi kun Unesko kaj UN pri internacia edukado
- aktive partopreni en la "Jaro de la Familio" de UN 1994
- kontaktadi kun jam konataj internaciaj edukaj organizaĵoj
- aktive kunlabori en la Projekto "Eŭropo 1992" de UEA/ILEI/EEU, kiu inkluzivas rilatadon kun edukministerioj
- krei kaj diskonigi superriĝardon pri la ĉefaj fondaĵoj kaj organizaĵoj agantaj internacie pri lingvo-instruado
- proponi nacilingve tradukitajn aŭ verkitajn artikolojn

al la faka gazetaro (edukado por internaciismo, la prope-
deŭtika, praktika kaj etika valoroj de E-o, rezultoj de E-instruado)

- reprezentiĝi en internaciaj konferencoj pri edukado kaj lingvo-instruado

9. Eldonado

- trovi konvenajn nekostajn kompost- kaj pres-eblojn (prefere kiuj mildigas transpaĝajn problemojn)
- akiri taŭgajn manuskriptojn, samtempe bezonatajn kaj enspezigajn (lernolibroj, gvidiloj, kasetoj, vidbendoj, laborlibroj, pedagogiaj verkoj, ekzerclibroj, materialo pri lingvaj problemoj)
- krei administran bazon por efike pretigi librojn: trakti kun aŭtoroj, presejoj, eldonistoj kaj distribuistoj
- rilati kun fidindaj eldonejoj pri komunaj eldonoj por limigi la bezonon je kapitalo
- la plimulto de projektoj kovru siajn kostojn ene de 12 monatoj (bezonataj sed neredimentaj verkoj estu esceptaj, kies kostojn kovru la finance sukcesaj)

10. Movadaĵ agadoj

- eluzi la diskonigajn eblecojn de la movado por teni movadanojn bone informitaj pri la Ligo
- fortigi la renomon de Tago de la Lernejo
- proponi al UEA, ke ILEI reĝisoru edukan ĉeftemon de iu estonta UK
- avangardi en la movada diskuto pri planado kaj strategio
- kunlabori kun LIBE, TEJO, AIS, ELTE, KCE, IEI, TEC kaj aliaj fakaj asocioj de UEA
- partopreni (per prelegoj, budo, ekzamensesio) aliajn movadajn kongresojn kaj aranĝojn

Elektis: Miroslav Malovec

SOMERA STUDENTA E-RENKONTO

GDANSK 17.-23.8.1992

estis organizita jam la dekkvaran fojon de PSEK (Pola Studenta E-Komitato), kiu ĉijare festas sian 20-jariĝon. Partoprenis ĉirkaŭ 30 gejunuloj el multaj jaroj, nian sektion reprezentis L.Karešová. Ĉiutage duontaga ekskurso al memorindaĵoj (Westerplatte, Oceana Muzeo, proksimaj urboj), dua parto de la tago dediĉita al prelegoj (ekz. pri bahaismo, vojaĝo al Siberio, kurso de la pola). Plej multe oni parolis pri la historio kaj nuntempo de PSEK. Oni invitis eks-aktivulojn de PSEK al solena tago aranĝita en Malnova Urbodomo kaj finita per balo.

EVENTOJ

dusemajna Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado el Hungario alportas dufoje en monato la plej freŝajn informojn. En 26 numeroj sume sur 208 paĝoj de formato A4 vi ricevas kronikon de la tuta jaro en Esperantujo. Ĝi estas samtempe la plej malmultekosta eksterlanda Esperanto-gazeto, 13 Kčs por unu ekzemplero (el tio 7 Kčs de sendokosto inter Hungario kaj ĈSFR). La abonon oni pagas duonjare (170 Kčs) je la adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvořák, Jilská 10, 110 01 Praha.

TENDARAJ TAGOJ I kaj II

estas moderna internacia lernolibro por geknaboj 10-14-jaraj, verkita de Stefan McGill, prezidanto de ILEI (Hungario) kun multaj ilustraĵoj de Pavel Rak. Paroligaj vivaj tekstoj paŝon post paŝo lerniĝas novajn vortojn kaj gramatikaĵojn. En Ĉeĥoslovakio havebla kontraŭ 55 Kčs (unua volumo) kaj 60 Kčs (dua volumo) ĉe Esperanto-Centro Poprad, Sobotské nám. 6, 058 01 Poprad.

MEZ-EŬROPA JUNULARA SEMAJNO OLMOUC 1992

De la 9-a ĝis la 16-a de
justo okazis en Olomouc ĉefa
aranĝo de tiu ĉi jaro - MEJS.
Entute partoprenis 110 junaj
gesperantistoj de la tuta
Eŭropo (Aŭstrio, Belgio, Brita-
nio, Bulgario, ĈSFR, Finnlando,
Francio, Germanio, Hispanio-
Katalunio, Hungario, Italio,
Kroatio, Nederlando, Pollando,
Slovenio, Svedio), eĉ ekster-
eŭropanoj - tajvanino kaj isra-
elanoj. Laŭ la plano estis la
programo organizata en du li-
nioj. En faka parto, kies temo
estis "Ĉu komuna lingvo sufi-
ĉas?", oni prelegis pri psikaj
barieroj de la komunikado, me-
tudoj de rilakso, psikoterapio,
diskutis pri religioj aŭ pri
novparol' de Orwell. La dua
parto estis dediĉita al Mez-
Eŭropo, okazis forumoj pri la
nunaj Ĉeĥoslovakio kaj Pollando
kaj tre sukcesis Nacia vespero,
kie Moravio estis prezentita
kiel folkloro kaj vina regiono.

Marde (12.9.) vespere pre-
zentiĝis al ili la ensemblo
"Taneĉnica" (Dancistino) de la
Valaĥia Rondeto en Brno, fondi-
ta en 1947. La rondeto okupiĝas
pri la folkloro de Valaĥio, mal-
riĉa nordorienta parto de
Moravio. La ensemblon antaŭ la
MEJSanoj enkondukis Attila Kas-
zás el Hungario kiel lerta
konferanseo.

Krom tio dum la tuta semajno
eblis pliperfektigi sian Espe-
ranton en paroliga aŭ perfekti-
ga kursoj, por eksterlandanoj
estis ŝajne alloga kurso pri la
ĉeĥa lingvo, kiun ili preskaŭ
amase vizitis. Ĉar partoprenis
kelkaj estraranoj de TEJO, oka-
zis TEJO-forumo, kiu pritraktis
diversajn aspektojn de junulara
agado kaj naci- kaj internaci-
nivele. Komprenible estis pre-
paritaj multaj ripozprograme-
roj, kiel ekz. videofilmoj,

diskoteko, sportaj ludoj, kur-
soj pri la ĉeĥa kuirado kaj
makrobiotiko, duontagaj ekskur-
soj al ĉirkaŭaĝo de la urbo kaj
tuttaga ekskurso al skanzeno en
Rožnov pod Radhoštěm, grotoj en
Mladeč kaj bierfarejo en Lito-
vel. Vespere krom la Nacia ves-
pero okazis Interkona vespero
en stilo "country", sovaĝa ĵa-
zokonzerto, vespero kun sorĉis-
to, vespero ĉe fiŝlagoj kaj
tradicia Internacia vespero.

Estis eldonita MEJS-LIBRO
kun priskribo de la MEJS-urbo
Olomouc, kun programo kaj la
tuta junulara komitato kaj mi-
nikurso de la ĉeĥa.

Oni povas diri, ke la aranĝo
sufiĉe sukcesis - tio evidentas
laŭ reagoj de multaj partopre-
nantoj. Ni atendu senpacience
ankaŭ reagojn en junularaj ga-
zetoj, kiuj espereble estos
similaj.

V. Chvátalová

KONFERENCO DE SLOVAKA JUNULARO

okazis en Žilina (15.-17.5.-
1992), partoprenis ĉirkaŭ 20
personoj. La ĉeĥan junularon
reprezentis la prezidantino
M. Nýdecká kaj vicprezidantino
L. Karešová. Estis kontraktite,
ke ambaŭ junularaj sekcioj do-
nos reciprokajn avantaĝoj dum
siaj aranĝoj.

LINGVAJ KURSOJ EN PRAGO (2.-9.8.1992)

ripetiĝis post la pasintjara
sukceso, ĉifoje kun 35 homoj en
internulejo de mezlernejo en la
kvartalo Malešice. Grupoj de
komencantoj formis germanlin-
gvanoj kaj 3 ĉeĥaj knabinoj,
okazis ankaŭ kursoj por progres-
sintoj kaj konversaciaj. Antaŭ-
tagmeze instruado, posttagmeze
kaj vespere ekskursoj kaj kul-
turo.

PLUA SUKCESO DE E-FILATELISTOJ

KOMENIO KAJ INTERLINGVISTIKO EN FILATELO estis titolo de filatela ekspozicio en la sudmoravia Strážnice en la kulturdomo Srážničan. La urbo fieras pri la iama piarista lernejo, kiun Komenio vizitadis en la jaroj 1604-1605 kaj kie nun troviĝas muzeo de J.A.Komenio. La ekspozicio estis komuna aranĝo de Esperanto-sekcio de Asocio de ĉeĥaj filatelintoj, Klubo de filatelintoj en Hodonín kaj Esperanto-klubo ĉe Kulturdomo Strážničan kun subteno de Asocio de slovakiaj filatelintoj en Bratislava. La ekspozicion vizitis ankaŭ aŭtobuso de kongresanoj el Vieno.

Okaze de la ekspozicio estis eldonitaj specialaj stampiloj kaj katalogo, kiu enhavas tekstojn ĉeĥajn kaj esperantajn, pri la urbo, pri Komenio, pri Esperanto en filatelo.

En la ekspozicio la vizitantoj povis vidi apud alitemaj eksponaĵoj eĉ eksponaĵojn je la temo de Esperanto. La plej altan premion de la ekspozicio - malgrandan orumitan medalon kun premio de la ekspozicio - gajnis la konata eksponaĵo ESPERANTO EN FILATELO de s-ano Vl. Hasala el Strážnice. Grandan arĝentumitan medalon gajnis eksponaĵo ESPERANTO - INTERNACIA LINGVO KAJ ĜIA REAGO EN FILATELO de s-ano Alois JAKUBEC el Hranice. Honorpremio de la ekspozicio gajnis la eksponaĵo ESPERANTO de s-ano Odon Horák el Brno. La ekspozicia ĵurio laboris sub prezidanteco de la konata filatelisto ing. Walter Müller el Ostrava.

Aperis kelke da artikoloj en diversaj ĉs. ĵurnaloj. Pri la ekspozicio ktp. informis ankaŭ radio, televido kaj ĈTK, kiuj ankaŭ persone partoprenis inaŭguron de la Ekspozicio.

La ekspozicion vizitis personoj el pli ol 30 landoj de la Tuta Mondo. Dum la ekspozicio la poŝto uzadis entute du diversajn afrankmaŝinstampilojn kun teksto en Esperanto. Aŭtoro de ambaŭ estas inĝ. arĥ. Karel Kuča el Ĉeská Budějovice.

Eksterordinaran sukceson gajnis ankaŭ la eldono de porokaza, esperantlingva glumarko por registritaj poŝtaj sendaĵoj kun teksto: "J.A.COMENIUS en filatelo 25.7.-2.8.1992 Strážnice"

Interesiĝantoj povas skribi rekte al: ESPERANTO, poŝtkesto 34, 696 62 Strážnice.

Vladislav Hasala



KVAR JARCENTOJ - KOMENIO

ILEI eldonis por geknaboj interesan broŝureton tradukitan el la nederlanda lingvo pri la vivo kaj verko de Komenio. Sur 38 paĝoj de formato A4 kaj sur la koverto la junaj legantoj renkontos 24 desegnaĵojn (ankaŭ de Brujgelo kaj Cyril Bouda) kaj interesajn tekstojn pri la vivo de Komenio, pri lia instruado kaj pri liaj ideoj de la Internaca Lingvo.

La libron preparis profesoroj Klaas Pit kaj Bert Stilma (nederlande) kaj esperantigis s-ino Barcsay Zsuzsa. Ekzistas ankaŭ versioj hungara, ĉeĥa kaj pola.

RADIKALA PARTIO

en sia propono de Rezolucio por la Eŭropa Parlamento prezentas planon por enkonduki Esperanton en lernejojn. Multaj el vi jam decidis subteni la aktivecon de RP per membriĝo en ĝi (79 personoj) pagante la jaran kotizon 365 Kčs, kelkaj eĉ plie aliĝis al Radikala Esperanto-Asocio per pluaĵ 52 Kčs. (Se ankaŭ vi volas aktive subteni la iniciaton, skribu al Radikální Strana, Krakovská 9, 110 00 Praha.)

La eventuala enkonduko ne estus facila afero - estus bezonataj lernolibroj, sed ankoraŭ pli profesiaj instruistoj, ĉar solvo aplikata ĉe la rusa lingvo en la kvindekaj jaroj (la instruisto estis du lecionojn antaŭ la lernantoj) kompromitis la tutan projekton kaj povus Esperanton pli likvidi ol venkigi. Estas do necese unue plejdi por enkonduko de Esperanto al pedagogiaj altlernejoj, kiuj edukus bonkvalitajn profesiajn instruistojn kaj samtepe prepari taŭgajn lernolibrojn, nur poste eblos enkonduki la lingvon en elementajn kaj mezgradajn lernejojn.

- mm -

KET KATOLIKA ESPERANTA TENDARO

En belega valetto ĉe la vilaĝo Sebranice eksonis E-kantoj kaj super la tendaro ekflagris E-flago. De la 8-a de aŭgusto ĝis 22-a de aŭgusto 1992 travivis tie interesajn tagojn esperantistoj-katolikoj. Krom ĉeĥaj kaj slovakaj samideanoj estis en la tendaro ankaŭ germano, polinoj kaj francoj, entute 63 personoj. La plej juna estis dujara Paŭlinjo.

Ĉiutage matene povis tendaranoj ĉeesti sanktan meson, ĝis la tagmezo lerni Esperanton en kursoj, posttagmeze laŭplaĉe gimnastiki, naĝi en najbara

baseno, diskuti en spiritaj rondetoj, sporti. Lunde ili povis partopreni ludon "serĉado de trezoro" kaj marde aŭtobusan ekskurson al Polička kaj pilgrimon al Chlumeck. Vesperajn tendarfajrojn ĉeestis ankaŭ vilaĝanoj el Sebranice. La titolon "Miss Sebranice" gajnis Pavel Baroš prezertanta italan belulinon Jozefina. Grandan aplaŭdon rikoltis ankaŭ Ulrich el Germanio kiel Gertruda kaj Jiří Mitáš kun riĉa barbo kiel Franceska el Hispanio. La partoprenintoj dankas al la organizinto Miloš Šváček.

ĈINA PROPONO

El Ĉinio ricevis nia vicprezidanto Ing. Dvořák jenan proponon:

- 1) reciproke interŝanĝi vizitojn inter niaj komercistoj por fari komercan negocon pri ĉintradicia medikamento, metiartaĵoj, malpezaj industriaj produktoj, vestoj, manĝaĵoj ktp.
- 2) establi klinikojn ĉe vi aŭ sendi sanprotektan vizit-grupon viziti Ĉinion por lerni aŭ kuraci per akupunkturo kaj masaĝo aŭ ĉinmedikamento.
- 3) varbi interesulojn kuninvesti en taŭgaj entreprenoj aŭ en Ĉinio aŭ en via lando
- 4) helpi starigi ĝemelan rilaton inter via kaj nia universitatoj precipe kun nia Scienc-teknika Esperanto-Instituto, ĉe Ĉina Scienc-Teknika Administra Universitato.
- 5) Interŝanĝi gestudentojn fari unumonatan studviziton antaŭ diplomiĝo por akiri diplomon post faka ekzameno de ekonomikomerca kurso.

Shen Chenru, 935-203 Bao Fu Si, 100086 Beijing, Ĉinio, telefono 22474 A SCHI CN, fakso: 00861-8011095.

MONDKONGRESO DE HANDIKAPULOJ

La Unuan Mondkongreson de Esperantistoj-Handikapuloj partoprenis 74 esperantistoj el 8 landoj en la banloka urbeto Františkovy Lázně de la 18-a ĝis 25-a de julio 1992. Plej longan distancon travojaĝis blinda samideano el Kanado. Distran kongresan programon, celitan al intereso de handikapitaj homoj, riĉigis ekskursoj al okcidentbohemiaj banlokoj kaj al la interesa urbo Cheb (Ĥeb), lumbilda vespero pri Latinida Ameriko, kultura programo de kvar artistoj el Ústí nad Labem, sperte gvidata de s-ano Smyčka, kaj aŭskultado - en parko ĉe akvofontano - de promenadaj koncertoj kaj dancmuziko el proksima restoracio. Esperante babilantaj homoj vekis intereson de multaj aliaj promenantoj - jen plej efika propagando.

(F. Molík, Náchod)

INTERNACIA FESTIVALO POR LA "DUA GENERACIO"

por personoj 25-55jaraj (mezaĝuloj) kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj (do ankaŭ gejunuloj estas bonvenaj) estas preparita vico da klerigaj prelegoj en la sudgermana urbo Kloster Höchst (50 km sudoriente de Frankfurt/Main) en la tagoj 27 dec 1992 - 3 jan 1993. (En la sama tempo okazigas germana junularo similan aranĝon por gejunuloj aliloke.) Prelegoj kaj kursoj dumtage, interesa programo vespere. Tradicia Silvestra Balo kun granda bufedo. Tuttaga ekskurso al konata urbo Heidelberg (1613-1614 tie studis Komenio) kaj najbara vinregiono kun vizito en vinkelejo de familio Kiefer. Por infanoj speciala programo. Kotizoj: 170 DM (infanoj 2-13jaraj), 280 DM (gejunuloj 14-24jaraj), 400

DM (plenkreskuloj). Pagoj ĝis 30.11.1992 kun rabato (150-250-350 DM). Skribu al: Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, D/W-3501 Niedenstein, tel. +49-5624-8007.

SEKCIO DE NATURPROTEKTADO

- en majo ni sendis materialojn pri Jeseníky, pri regiono de Litovel kaj pri nia sekcia agado al ekologia kongreso ECO-92 en Brazilo (1.-12.6.1992), kie ankaŭ esperantistoj preparis ekspozicion;

- sabate 20.6.1992 okazis la II-a Esperanto-suprenmarŝo al Praděd (1492 m). Partoprenantoj ricevis dufolion kun informoj pri Jeseníky en Esperanto. Ĉe la kabano Barborka ili plantis kelkajn arbetojn kaj en la kabano Kursovni ili vizitis ekspozicion de bildkartoj pri la pasinteco kaj estanteco de Praděd. Celo de la marŝo estis belvidejo 25 m super la tero en la televizia elsenda turo alta 162 m;

- la venontjara III-a E-suprenmarŝo al Praděd okazos verŝajne enkadre de turismaj tagoj en Jeseníky. La partoprenantoj vizitos Rejviz kun muskaj lagetoj, Zlatý Chlum, la urbon Jeseník, Banlokun Jeseník k.s. kaj eŭropan unikaĵon: fabrikon de manfara papero kun muzeo de papero en Velké Losiny. Jam estas preparita flugfolio pri ĝi, havota aŭtune.

RENKONTO EN TĚRBIHOŠŤ

Temis pri semajnfina ripozo (26.-28.6.92) en vilaĝa domo kun antaŭferia programo (ludoj, ekskursoj, tendarfajro). Partoprenis 12 homoj. Venontjare ripetebla.



Anita Perič Altherr: **Ne facilas esti SLOVENO EN ITALIO**; Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, presis GRAPHART, Triesto, 1991, 160 paĝoj, formato A5, eldonkvanto kaj prezo ne indikitaj

La aŭtorino prezentas la slovenan minoritaton en Italio, ĝiajn historion, problemojn, kulturon kaj religion. Dolore ŝi rememoras suferadon de slovenoj sub faŝisma reĝimo, sed ĉefe ŝi priskribas la nuntempan vivon. La titolo mem jam duondiras, ke la stato de minoritataj rajtoj en Italio ne kontentigas, ke slovenoj ankoraŭ devas batali por plena egalrajtigo, politika kaj kultura. Gravan parton de la libro formas fragmentoj el la slovena literaturo, prozo kaj poemoj (la lastaj ankaŭ en originalo).

Miĥail Bulgakov: **La Majstro kaj Margarita**, trad. S.B. Pokrovskij, eldonis Sezonoj, Sverdlovsk 1991, formato A5, 376 paĝoj, eldonkvanto 1500 ekz., prezo 204 guldenoj (tia estis en Vieno)

En serio Oriento-Okcidento sub aŭspicio de UEA aperis kiel 26-a verko la glorfama majstraĵo de rusa disidenta aŭtoro Miĥail Bulgakov (1891-1940) **La Majstro kaj Margarita** okaze de la 100-jara datreveno de la verkisto. La tradukon de S.B. Pokrovskij redaktis Aleksander Korĵenkov (kiu dezirus eldoni ankaŭ Militon kontraŭ Salamandroj kaj Ŝvejkon, kaj nun li havas en preparo faman libron "Hobito" de Tolkien).

La antaŭparolon verkis estraranino de UEA pri kulturo, kroatiĥo Spomenka Štimec. Ni citu ŝiajn vortojn:

La plurtavola strukturo de la romano, rekte fontanta el la vasta sperto de la monda kaj rusa literaturoj, donas eblecon de diversaj stilaj kaj ideaj - ankaŭ filozofiaj - interpretoj. Prezertante "romanon en romano" la aŭtoro elkonstruas du paralelajn rakontojn. La Majstro enkorpiĝas literaturan kreanton de la sovetia epoko, kiu lezas la regantajn normojn de la literatura procedo. Dum li prezentas la principon de la Kreado, Margarita, kiu kun la Majstro dividas la titolon de la verko, reprezentas eternan virinan principon, virinon, kiu nur amante realiĝas, konante nek timon nek malkuraĝon. La Majstro kaj Margarita estas tiel aparta verko, ke malfacilas trovi al ĝi rivalon en la tuta rusa literaturo. Ĝia beletra valoro estas tutmonde agnoskita: en multaj lingvoj de la mondo ekzistas ĝiaj tradukoj.

Bulgakov kondukas nin jen tra Moskvo, jen tra la rezidejo de Poncio Pilato, kiam li juĝis Kriston, jen tra la psiko de siaj herooj. La lingvaĵo de la tradukisto respegulas la etosojn, la stilo estas riĉa, kuraĝe inventema, tamen klara kaj facile komprenebla. Interesa estas uzo de -er- ĉe verboj por montri unuopan agon: tremeri = fari unuopan ekstremon. Post la romano sekvas riĉaj komentoj kaj klarigoj. Legaĵo atentokapta kaj instrua samtempe verŝajne sukcesos akiri multajn legantojn malgraŭ la alta prezo. Tamen eblas trovi ankaŭ aliajn malpli kostajn vojojn por akiri tiun raran libron. Plej bone kontaktu rekte la redaktoron (Aleksander Korĵenkov, 620014 Jekaterinburg-14, pk 162 Ruslando).

Recenzis: Miroslav Malovec

prof. Eduard Gašinec

UNUAJ INSTRUPROGRAMOJ DE ESPERANTO POR SLOVAKAJ GIMNAZIOJ

Komence de septembro 1990 supera instanco de Slovaka Respubliko Ministerio por lernejaferoj, junularo kaj korpkulturo en Bratislava aprobis la unuajn slovakajn kadrajn instruprogramojn de Esperanto por unu-lernojara kurso de libervola nedeviga instruobjekto en gimnazioj (Gašinec, 1990/91). Du monatojn antaŭe la estraro de nia Esplorinstituto de Pedagogio en Bratislava komisiis min plenumi ĉi tiun ekstraordinaran kaj gravan taskon. Do fine Esperanto estas establita en lerneja sistemo ankaŭ en Slovaka Respubliko.

Ĉe la verkado de instruprogramoj oni eliras el la mondfama morava-slovaka filozofa kaj pedagogo Johano Amoso Komenio, fondinto de fremdlingva instruado/lernado, kiu en sia antikvo-nova plej sistema verko "Plej nova metodo de lingvo-instruado" (1648), Methodus linguarum novissima, apogas la instruadon/lernadon de fremdaj lingvoj al konscia scipovo de unuopaj lingvaj ebenaĵoj, planoj de gepatra lingvo (Komenský, 1959, paĝ. 104-105).

Ĉe la laborado de instruprogramoj oni eliras el evidenta per si mem kaj ĝenerale akceptita aksiomo de mortinta universitata profesoro Emil Stračár, direktoro de Esplorinstituto de Pedagogio en Bratislava, laŭ kiu la selektado de instruenhavo, lernita enhavo havas determinantan funkcion de instruobjekto kaj influas la modeladon de instruenhavo en instruprogramoj, ĉe kio elireja faktoro estas instru-edukaj celoj (Stračár, 1977, paĝ. 194).

Komence en instruenhavon estus envicigita mallonga enkonduko en historion de internaciaj artefaritaj lingvoj inkluzive de Esperanto. La gelnantoj devas plu alproprigi la gramatikan kaj la komunikan kompetentecojn, ĉe kio lingvaj informoj (fonetikaj, ortografiaj, morfologiaj, sintaksaj, leksikaj kaj derivaj) ne estas celo, sed rimedo por sinkrone disvolvi kaj atingi komunikan kompetentecon (parolajn kaj skribajn lertecojn), t.e. kapablecon en adekvata eksterlingva situacio eniri en lingvan interakcion. La gelnantoj alproprigas unue la receptivajn (pasivajn) agadojn, t.e. a) aŭdan (fonikan) akceptadon de lingvaj informoj kaj komunikaĵoj (per aŭskultado), b) vidsensan akceptadon de skribitaj kaj presitaj informoj kaj komunikaĵoj (per legado kaj ortografio). La gelnantoj ankaŭ alproprigas la produktivajn (aktivajn) agadojn, t.e. a) sonecan transdonadon de lingvaj informoj kaj komunikaĵojn (per parolado) kaj b) skriban kaj presitan transdonadon de lingvaj informoj kaj komunikaĵoj (per skribado, presado, ortografio).

La selektado de plej ekkonataj fonetikaj, ortografiaj, gramatikaj, leksikaj kaj vortfaradaj faktoroj en instruprogramoj prezentas sin sur fono de la slovaka lingvo kiel adekvataj kaj observeblaj pedagogiaj fenomenoj en instruprocezo kaj respondas al interna strukturo de instruobjekto Esperanto kaj fine nur en iu mezuro al eksteraj, ekzogenaj faktoroj.

En instruprogramoj estas montrita fenomeno, ke Esperantaj vokaloj estas identaj kun la slovakaj, t.e. estas buŝaj, klaraj, nereduktitaj kaj malfermitaj. En instruenhavo konfronte kaj kompare oni prezentas, ke en la fonologia sistemo de Esperantaj konsonantoj estas ĉeestantaj identaj fonologiaj opozicioj de la eco "voĉeco - senvoĉeco" kiel en la slovaka, jene duopoj de kontraŭstarantaj konsonantoj b-p, v-f, d-t, dz-c, z-s, dž-ĉ (ĝ-ĉ), ž-š

(ĵ-ŝ), g-k, h-ch (ĥ) portantaj la signifon, kiuj estas kapablaj precize diferencigi la sencon de minimumaj slovakaj kaj ankaŭ Esperantaj paroj de vortoj kaj vortformoj. Rigardu Esperantajn kaj slovakajn ekzemplojn:

besto - pesto : buk (*fago*) - puk (*1. florburgono, 2. hokedisko*);
vino - fino : váza [*va:zo*] (*florvazo*) - fáza (*fazo*); medio -
metio : veda (*scienco*) - veta (*frazo*); edzo - eco : sadza (*fulgo*) -
sáca (*li/ŝi/ĝi puŝas*); zono - sono : koza (*kaprino*) - kosa
(*falĉilo*); kaĝo - kaĉo : džudo [*ĝudo*] (*judo*) - ĉudo [*ĉudo*]
(*strangaĵo*); ĵipo - ŝipo : župa [*jupa*] (*departamento, administra distriktaro*) - ŝupa [*ŝupa*] (*1. ekstera krusteto de frukto aŭ de grajno, 2. bato, unuopa ektuŝeto per rapida movo per mano aŭ man-tenata objekto*); gudro - kudro : Gita (*ina baptonomo*) - kyta [*kita*] (*besta femuro*); horo - ĥoro : prah (*sojlo*) - prach [*praĥ*] (*polvo, pulvo*).

La fonemoj *p, t, k* estas produktitaj sen la aerblovo, sen aspiracio. La slovakaj lingvo estas same kiel Esperanto relative fonetika lingvo, t.e. al sama grafemo respondas la sama fonemo (sono), kaj reciproke.

En lernita enhavo oni mencias, ke en Esperanto la vorto kun pli ol unu silabo havas akcenton sur antaŭlasta silabo kiel en centroslovakaj kaj orientoslovakaj dialektoj kaj ankaŭ en prononcado de plej bonaj geaktoroj kaj bonaj oratoroj. La pli laŭta silabo estas portanto de la nefonologia longeco kaj havas dislimigan funkcion kaj samtempe signalas la finon de la vorto (Stanislav, 1976, paĝ. 218-224).

En la instruenhavon estas envicigita temo pri dinamika produktiveco de elastaj vortfaraj modeloj (tipoj) en Esperanto helpe de monosemaj (unusignifaj) sufiksoj, kiuj estas pli oftaj kaj pli malpli similas al la slovakaj. Sed en Esperanto ankaŭ realiĝas unuverbiĝo, semantika kondensado sur la bazo de kunmetaĵo. La kunmetita vorto enhavas du aŭ plurajn vortojn. Tiuokaze en la slovakaj troviĝas semantika kondensado sur la afiksaj, sufiksaj derivaĵoj (vortfarado). Derivita vorto enhavas unu radikon (vorton). Ekzemple: lernolibro = učebnica [*učebnjica*]; librotenisto = účtovník [*u:ĉtoŭnji:k*].

La fonetikaj, gramatikaj, leksikaj kaj derivaj informoj devas sinkrone kaj profite disvolvi en komunikan kompetentecan de gelnantoj, kiuj devas ellerni paroli kaj sukcesi unue en tiuj ĉi tute klare eksplicitaj sociaj (interpersonaj) situacioj: esprimi mallongan konsenton aŭ ĝentile rifuzi oferton, elparoli malkonsenton kun la enhavo de anonco, esprimi peton, deziron, ĝojon, bedaŭron kaj ekskuzadon, esprimi, ke ion al ili plaĉas aŭ ne plaĉas, uzi ordinarajn salutojn kaj alparolon, prezenti sin kaj adiaŭi, danki kaj esprimi proponon, inviton kaj malpermeson.

Krom tio la gelnantoj devas ellerni paroli kaj sukcesi due en tiuj ĉi precize esprimitaj standardaj situacioj: orientiĝi en la urbo, elserĉi kuraciston, aĉeti vojaĝbileton, bileton al kino, al teatro kaj al sporta entrepreno, aĉeti nutraĵojn kaj trinkaĵojn, aĉeti gazetojn (ĵurnalojn), librojn kaj periodaĵojn, revuojn, mendi manĝojn kaj trinkaĵojn, skribi ilustritan poŝtkarton, bondeziron, mallongan leteron, skribi mendon de libro kaj dediĉon en ĝi, sendi telegramon.

La lernantoj parkere ellernas kaj scias ĝuste deklami rimdiretojn kaj versaĵetojn, kanti esperantlingvajn kantojn (inkluzive de slovakaj kaj alinaciaj popolkantoj kaj modernaj kantoj) kaj

scipovas ilin ortografie skribi. Oni devas lerni parkere mallongajn literaturajn tekstojn, kiuj estos por ĉiam garditaj en la subkonscio (Pauli, 1982, paĝ. 37).

En instruplanoj oni akcentas, ke la plej grava konsistaro de instruenhavo de E-o estas koneksa modela elirteksto, utiliganta interfakajn aŭ inter-instru-objektajn rilatojn, kiuj fine helpas motivi, integri kaj pliperfektigi la instruhorojn (Stračár, 1977, paĝ. 174-180).

Tial la unutemaj tekstoj, kiuj devas esti interesaj laŭ enhavo kaj etoso, ne devas esti superflue sciencaj, tio signifas, ke ili devas esti komunike saturiĝintaj per lingvaj kaj komponiciaj studitaj fenomenoj, do ne estas superflue saturiĝintaj per faka informo kaj pro tio ili povas esti eluzitaj sen riziko de la perdo de propra aŭtonomio de E-o kiel instruobjekto.

La instruenhavo de la literaturo en unu-lernojara kurso konsistas el ĉefaj esperantlingvaj slovakaj, ĉeĥaj kaj mondfamaj verkistoj kaj tradukistoj.

Oni devas iom karakterizi rekomenditajn metodojn de instruado de E-o, diri pri konstruado de demandoj, priparoli pri taksado de konoj, lertecoj kaj kutimoj de lernantoj. La prezentita strukturo de instruenhavo de E-o en unuaj slovakaj instruprogramoj ebligas eluzi plej bonan miksan metodon (Pauli, 1985, paĝ. 23), tio signifas unue konscian-konfrontan gramatikan-tradukan metodon eluzantan inter-instru-objektajn rilatojn (ekzemple la komparon de lingvaj reguloj kaj fenomenoj inter E-o kaj gepatra slovak lingvo), due la konscian-praktikan metodon, tio signifas a) kombinaĵon de la direkta A.Cseh-metodo, kiu estas modifita por Esperanto-instruado/lernado laŭ aŭdio-lingva metodo de Ch.C.Fries kaj R.Lado, kaj b) de la tiel nomata zagreba metodo, kiu estas modifita por Esperanto-instruado/lernado laŭ aŭdio-vida metodo de P.Guberina kaj P.Rivenc.

En instruprogramoj oni rekomendas al geinstruistoj ĉe la kontrolo kaj demandado meti adekvatajn kaj subtilajn demandojn pri sciigo de instrumaterialo laŭ kriterioj de demanda semiotiko, t.e. unue kiuj plenumas la kriteriojn de logika sintakso (havas ĝustan frazstrukturon), due plenumas kriteriojn de logika semantiko (estas signife unusencaj) kaj trie plenumas kriteriojn de logika pragmatiko; tio signifas, ke a) estas adekvataj al lernantoj kaj b) estas samtempe uzeblaj en praktiko. Do preciza, vera kaj ĝusta respondo dependas de rekta metodo de la demandoj.

Oni ne klasifikas la konojn, lertecojn kaj kutimojn de gelerntoj en unu-lernojara kurso de Esperanto, sed pritaksas laŭ trafa kaj rekta esprimado, laŭ aktiva rilato al Esperanto, laŭ intereso, sinteno, iniciativo kaj ekpenseco, laŭ korespondado kun eksterlandaj esperantistoj kaj laŭ memstara elekto de konvena literaturo.

Moderna didaktiko de fremdlingvoj konstruita sur la kompara kaj konfronta bazo permesas en instruprogramoj de E-o eluzi kaj utiligi pozitivan transferon el gepatra slovak lingvo en genezo de lingvaj fenomenoj (Gašinec, 1986, paĝ. 86). Krom tio instruado/lernado de fremdaj lingvoj kaj de Esperanto apogita al gepatra lingvo havas grandan signifon kaj estas tre grava por bona menseduko kiel speciala koncepto kaj por disvolvigo de gramatika pensado. Laŭ universitata profesoro Evaldo Pauli la gepatra lingvo en tiu rilato ludas neanstataŭeblan rolon (Pauli, 1983, paĝ. 75).

ALOIS JIRÁSEK

KIAM ONI EN PRAHA LUDIS LA VERKON DON JUAN UNUAFOJE
(traduko de J. Chvosta)

Hejme, en la ĉambro, kiu estis multe malheliĝinta pro la nubokovrita ĉielo, oni jam pli frue lumis. Ekstere ekestis krepusko kaj pluvigis. Kvankam Tham jam estis certiginta seĝojn kaj kvankam ankoraŭ longe estis antaŭ la komenco de la ludo, li tamen insistis, ke ili tiom frutempe elveturu el la hejmo. Nome li sciis, ke estos treega homtumulto antaŭ la teatrejo. Oni elkonis tion jam en la stratoj, tra kiuj ili veturis. Ĉie sufiĉe da homoj, eĉ se la densa pluvo vipis malbonan kaj kotmakulitan pavimon. Ĉiuj celis preskaŭ en la sama direkto, al la Frukta foirejo, al la Nostic-teatro: viroj en triangulaj ĉapeloj kaj en kolumaj manteloj solaj aŭ kun sinjorinoj en vualtukoj aŭ manteloj. Ie kaj tie oni vidis grandan pluvombrelon, tiam ankoraŭ sufiĉe raran. Ĉi tie kaj tie vokis al la amasoj portistoj, portante sinjorinon en homportilo, ke oni cedu al ili el la vojo.

Krurdismet-veturiloj *), kaleŝoj kaj kabrioletoj sur risortoj ankaŭ ĉiuj radbruis en tiu direkto: sed kiam ili jam proksimiĝis al sia celo, al la teatrejo, ili devis veturi malpli rapide aŭ plene halti kaj atendi, ĝis la vojo plena de veturiloj antaŭ ili malplenetigis.

"Tiel ni ne ĝisatendus," diris Tham. "Nenio alia restas ol atingi la celon piede, kiel faras preskaŭ ĉiuj, eĉ se estas sufiĉe da koto ..."

Sinjorino Butteau konsentis. Tham elsaltinte helpis ŝin kaj Paŭlinon el la veturilo. Vualinte ŝin per siaj tukoj kaj iom levetinte la robojn ili paŝis trans la koto kaj kotakvojn al nemalproksima teatrejo. Tham liberigis la vojon por ili. Tio estis necesa, ĉar ĉirkaŭ la teatrejo fariĝis terura interpretado.

El ĉiuj flankoj, el la Frukta foirejo, el la Karba foirejo, el la Kavalira strato, el la Fera strato, el ĉie amase venis aroj da homoj, plejparte en la teatrejon. Multegaj ankaŭ restis ekstere, malzorgante la veteraĉon, kaj plimultigis tiel la amasojn da rigardantoj, alpremiĝe kaj nombre starantaj tie ĉi kaj observantaj pleje la moŝtulajn kaleŝojn, kiuj unuavice finveturis al la teatrejo. Du brulantaj lucernoĵoj antaŭ ĝi ĵetis tremantan malserenan brilon sur ĉiun ĉi tumulton kaj konfuzon, sur ĉiun ĉi ondadon kaj torentadon plenan de bruo kaj murmuro.

Kiam Tham kun sinjorino Butteau kaj Paŭlino sidiĝis sur la garantiitaj lokoj en la galerio, la teatro jam estis konsiderinde plena. Precipe ĉiuj galerioj estis plene okupitaj. Unu kapo tuŝapud alia, ĉie ŝtopplene, nome tiel, ke tiuj en la plej lasta vico alteniĝis sur la kolonoj kaj feraj stangoj kunigantaj la kolonojn. Ĉies vidoj turniĝis al la orkestro, ne bonkvalita, kun tri unuaj, du duaj violonoj, kun du violonĉeloj kaj kontrabasoj kaj apartenaj blovmuzikiloj. La piano en la orkestro estis ankoraŭ sollasita. La orkestrestro kaj komponinto de la opero, tiom longdaŭre kaj sopirege atendata, kiu estis sidiĝonta al ĝi, ankoraŭ ne venis.

Bruo, murmuro kaj zumado plenigis la teatron, kaj ĉie oni konversaciis nur pri la uverturo, do ke la servistoj disportante malsupre en la parteron malvarmigajojn, sensukcese prezentis limonadon kaj migdalan lakton, kaj same kun malgranda sukceso elvoka-



dis sur la galerioj la vendis-
toj irante ĉirkaŭronde: "Biero!
Frische Würste! Frisches Bier!
Biero!"

Jen kvazaŭ la vento blovus
trans la arbaro - stranga mur-
muro disflugis en la teatrejo.
Ie kaj tie eksonis pli laŭta:
"Aĥ!"

Venis teatra servisto en la
orkestrejon kaj disdonis parte-
sojn. Ili disiĝis flugrapide el
unu mano en la alian, jam ili
troviĝas sur la ambonoj. Jen
kvazaŭ post ekblovo de vento
ekus subita pluvego kaj ŝtormo,
do ekestis rapide en ĉiuj teat-
raj spacoj aplaŭdo. Potenca,
ununura, surdiga, en kiu dis-
tingiĝis dum momentoj amasaj
ĝojegaj krioj de gloro.

Kaj tiu, kiun oni tiom bonvenigis,
negranda vireto de nobla
vizaĝo, en blanke pudritaj haroj
kunplektitaj al harplekto, en
velura jako de malhelverda koloro
dankante komplimentis al ĉiuj
flanko; poste li rapide frapetis
kaj subite, kiam la teatro, kiu
antaŭe je unu fojo ekbruis, nun
ankaŭ same silentiĝis, eksonis la
unujaj sonoj de la uverturo al
Don Juan, potenca, solena.

La kurteno leviĝis supren kaj la
sileniĝinta teatro aŭskultis
la ravajn kantojn de Leporello,
Don Juan, Dona Anna, Don Oktavio.
Signore Bassi kiel Don Juan estis
bonega, ne malpli Dona Anna de
Teresa. Ankaŭ la prezentiĝoj de la
ceteraj, de signora Micelli,
signore Ponziani kaj de ĉiuj
meritis admiron kaj laŭdon.

La nekonvinkebla Don Juan
malaperis en la fendego kaj en
flamoj, jam finsonis la kanto de
ĉefaj personoj kaj de la ĥoro, ke
"trompa estas de l'mond' sort'" kaj
"kia la viv', sama la mort'".
Volupteco, senbrideco, tristeco kaj
ĝojo, arogeco kaj malesperado
elsonis en eterne famaj melodioj.
Nun mondkonata opero tiam estis
finita unuafoje. Treega laŭdo,
uragano da aplaŭdo, bruoriĉa voka-
do kaj krioj de ĝojo, rekono kaj
entuziasmo ree kaj refoje ton-
drantaĵ tra la teatro eĉ ne volis
sileniĝi. La aŭtoro de la nova
verko riverencis ĝojigite, feliĉega
pro scio kaj pruvoj, kiujn ne
ĉiam ĝuadas la aŭtoroj de artaj
verkoj, nome, ke oni komprenas
ilin.

Kiam ĉiuj malsupreniris, antaŭ
la teatrejo estis konfuzego.
Ĉirkaŭronde la homoj nur amasiĝis;
la kaleŝoj brue forveturis, la
krioj de koĉeroj aŭdiĝis, plue
konfuza mikso da voĉoj, vokadoj,
fajfetado de la melodieroj de
arĵoj, kiuj ĝis nun eĥis en
ĉies animoj. Kaj la nokto malhelega;
preskaŭ neniel helpis kontraŭ
ĝi malmultaj lucernoĵ ruĝe
flirtumantaj en la mallumon.

(el la 16-a ĉapitro de F.L.Věk, unua volumo)

*) rajdseĝaj kaleŝoj, en kiuj oni sidis krurdismete

Český esperantský svaz
110 01 Praha 1, Jilská 10

* * * STARTO * * *

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas
6-foje jare. Respondeca redaktoro:
**Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,
Ĉeĥoslovakio.**

Administratoro: Karel Daněk, poŝta kesto 425,
660 25 Brno 2, Ĉeĥoslovakio.

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe
nia asocio.

Nepravidelný věstník Českého esperantského
svazu. Vychází 6x ročně. Obdrží členové
svazu. Odpovědný redaktor: **Miroslav Malovec,
Bosonožská 15, 625 00 Brno.** Administrátor:
Karel Daněk, box 425, 660 25 Brno 2.

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Povoleno JmŘS Brno:
č.j. P/3-8847/91 ze dne 28.8.1991.
Podávací pošta:
664 03 Podolí u Brna